
# CARLAND Cross

M. OLEFFE — O. GRENSON

## 1 LA GOLEMO





ESPERAĴO

**Originala titolo:** *Carland Cross 1: Le Golem*
**Aŭtoroj:** Michel Oleffe, Olivier Grenson
**Jaro de originala publikigo:** 1991


Cifereca eldono de Studio Esperaĵo, decembro 2024
**Esperanta traduko kaj kompostado:** Mikaelo Kastro




LONDONO, GRANDA KAJ MISTERA ĈEFURBO DE LA BRITA IMPERIO, KIE TROVIĜAS KUNIGITAJ ĈIUJ RASOJ, KIUJN LA GRACIA KRONO DECIDIS SUBMETI. KAŜEJO DE LA PLEJ FIFAMAJ SEKTOJ, DE LA PLEJ NIGRAJ RITOJ. RIFUĜEJO DE LA PLEJ MALICAJ FRIPONOJ, DE LA PLEJ NESENTEMAJ KRIMULOJ, DE LA PLEJ KRUELAJ FRAŬDANTOJ. METROPOLO DE KRIMO, TEATRO DE MORTO, AGORO DE HORORO...
ĈIUJ ANKORAŬ MEMORAS LA AFERON PRI LA VIRINMANĜANTO DE ROTHERHITHE, ARESTITA DUM FESTENO PROKSIME DE HAVENO GREENLAND.
KAJ LA AFERON PRI LA KLUBO DE L' INFERAJ VIZAĜOJ, KIES ANOJ VENĜIS SIAN HIDECON TORTURANTE SENKULPAIN VIRINOJN.
KIU FORGESIS LA BANDITOJN DE BILLINGSGATE, KIUJ FARIS OFEROJN AL KALIO, LA SANGA DIINO?
AŬ LA SENKAPAN MURDISTON DE PARKO BURGESS, KIU ESTIS NUR MENSOGO?
ĈIUFOJE, TIUJ TERURAJ KRIMULOJ ESTIS TRANSDONITAJ AL LA LONDONA EKZEKUTISTO DANK' AL UNU VIRO.
ESPLORISTO DE NEEBLAĴOJ, LA PRIVATA DETEKTIVO PLEJ BONE PAGATA EL ANGLUJO:
CARLAND CROSS!
OLEFFE - GRENSON 90


JES, CARLAND CROSS, MIA MAJSTRO, ELEKTIS SIAN PLEJ ŜATATAN DISĈIPLON POR KE TIU (MI, ANDREW WHITE) SKRIBU LIAJN IMPONAJN MEMORAĴOJN...
LA MAJSTRO MALIMPLIKIS MISTEROJN KIEL ALIAJ MALIMPLIKIS LAĈOJN, UTILI-GANTE EKSTERORDINARAJN INTELEKTON KAJ INTUICION.
LI SCIIS ĈIUJN SCIENCOJN, LEGIS ĈIUJN LIBROJN KAJ SCIPOVIS ĈIUJN LINGVOJN EL LA MONDO, EĈ LA PLEJ STRANGAJN.
EN DA'S GÎNE ZIEVER.
LI DAŬRE POSTIRIS JUSTECON, KAJ EĈ NEGLEKTIS HOMAJN SENTOJN. VIRINOJ ESTIS INDIFERENTAJ AL LI, KROM SE ILI ESTIS KRIMULOJ.
NENIEL, SINJORINOJ.
ĈIAM LI EKKOMPRENIS ĈION ANTAŬ OL ĈIUJ ALIAJ, KAJ LIAJ KLARIGOJ ĈIAM KOMENCIĜIS PER «NU MIA KNAB'», KIO POVIS TEDI IUJN HOMOJN.
NU, MIA KNAB'.
SED NI PAROLU PRI LA ESPLORADO, KIU OKUPAS NIN. SERIO DA MISTERAJ KRIMOJ ESTIĜIS. NE EKZISTIS LIGO INTER LA MURDOJ, KROM LA NEKREDEBLA KORPA FORTO DE LA AGRESINTO.
VERŜAJNE, LA HORORA KRIMULO SERĈADIS ION. SINJORO CROSS ESTIS LA LASTA RIMEDO DE LA METROPOLA POLICO, KAJ KIEL KUTIME, JE LA KOMENCO DE LA ESPLORADO, CARLAND CROSS RESTIS SILENTA.



TIUN NOKTON, EN SORDIDA STRATETO INTER WHITECHAPEL KAJ SHOREDITCH, ĈE LA BUTIKO DE EBENEZER STEIN, MARĈANDEMA ANTIKVAĴISTO, KIU RIĈIĜIS DANKE AL SUSPEKTINDAJ NEGOCOJ.
MALBENITA! TIA MI ESTAS: MALBENITA!
JAM SES MORTINTOJ! DIO MIA, ĈU RILATAS AL LA LIBRO?
!?
KIU ESTAS TIE?
KLING



POSTE, EN LA METROPOLA POLICEJO.
JEN LA SESA VIKTIMO EN KELKAJ TAGOJ, ĈIAM LA SAMA SCENO SED NE ŜAJNAS ESTI LIGO INTER LA MORTIGITOJ. NIA ESPLORADO STAGNAS, AMIKO, KAJ MI NE PASIGAS BONAN MOMENTON KUN MIAJ SUPERULOJ ĈE STRATO DOWNING... ĈU VI BONVOLUS OKUPIĜI PRI ĈI TIU AFERO, SINJORO CROSS?
MEMKOMPRENEBLE, WINGFIELD ESTOS JE VIA DISPONO.
JES, SINJORO!
LAŬ VIAJ ORDONOJ, SINJORO!
KIO ESTAS VIA KONKLUDO, DOKTORO?
ESTAS STRANGE, SINJORO CROSS! LA VIKTIMOJ ŜAJNE ESTIS DISPECIGITAJ FARE DE ESTULO MIRINDE FORTA... KURIOZA AFERO.
ĈIUN FOJON, ONI TROVIS RESTAĴOJN DE RUĜA ARGILO PROKSIME DE LA VUNDOJ DE LA VIKTIMOJ.
LA HONORO DE LA METROPOLA POLICO ESTAS EN RISKO, SINJORO CROSS! DISPONU JE NIAJ VIROJ LAŬVOLE, SED JE DIO MI PETAS, ĈESIGU ĈI TIUN ONDON DA ABOMENINDAJ MURDOJ!
ANGLUJO POVAS KALKULI JE MI, SINJORO!
DANKON, SINJORO CROSS.
MIAOPINIE, SE CROSS EKESPLORAS LA AFERON, ĈIO FINIĜOS BALDAŬ.
KIU SCIAS! NIAJ PLEJ BONAJ DETEKTIVOJ JAM MALSUKCESIS.
13


NE! NE!
SKRIIINK
TOYNEBEE
STREET
LONDON
TIE! TELEFON-
BUDO, FINFINE!
ARTILLERY
LANE
METROPOLA
POLICO, HE!!
DRIIIING
DIABLE! ONI VOKU
TUJ CARLAND-ON
CROSS!


DOMO DE CARLAND CROSS. STRATO BAKER
KIA MISFORTUNO, LABORI DUM VETERO TIOM MALBONAS! MI ĈIAM ASERTIS, KE ĈI TIU PROFESIO NE ESTIS FARITA POR VI, SINJORO CROSS. NEK POR AFABLA JUNA VIRO KIA SINJORO ANDY. BONŜANCE, MI PREPARIS POR VI BONAN MANĜON.
DRIIIING
HA! ESTAS VI, WINSTON. JE IUJ HOROJ, ONI NE TELEFON-ALVOKU HOMOJN, DES MALPLI JE LA VESPERMANĜO-HORO!
URĜA AFERO? JES, LI ESTAS ĈI TIE.
SINJORO CROSS? JES, MALTRANKVILIGA TELEFONALVOKO. LA TELEFONANTO SUBITE ĈESIS LA ALVOKON, SED NI POVIS EKSCII LA LOKON: PROKSIME DE LIVERPULA STACIDOMO, VOJO ARTI-LLERY, SINJORO CROSS.
LONDON
PRENU ĈAPELOJN, MANTELOJN KAJ PAFILOJN, NI IRU, SINJOROJ!
JES JA! LA MANĜAĴO ATENDOS! KIA DOMAĜO! PUDINGO KAJ BOVLANGAĴO KUN AVELOJ!
HASTU, SINJOROJ! ĈIU MINUTO GRAVAS!
OL BD 21 G



KATEDRALO DE SANKTA PAŬLO
JEN LIVERPULA STACIDOMO, MIA KNAB'!
RIGARDU, MAJSTRO! KIEL TERURE!
SINJORO CROSS... AĤ! RABENO LOEW... LA MANUSKRIPTO... ĈIUJ MORTINTAJ...
LA GOLEMO! AĤ... LA GO...


LI HAVAS LA SAMAJN VUNDOJN KIEL LA ALIAJ VIKTIMOJ, SINJORO CROSS... KAJ ESTAS ARGILEROJ EN LA TELEFONBUDO, KIEL KUTIME.
HUM!
POLICE
NI REIRU AL STRATO BAKER, ĈI-FOJE MI SCIAS SUFIĈE MULTE!
LA MAJSTRO ĜENERALE KOMPRENIS ĈION TUJE. POR ĈI TIU AFERO, ONI BEZONOS KVARDEK PLIAJN PAĜOJN.
EN ĈI TIUJ OKAZOJ, LI SENFINE FUMIS PIPOJN, KUN LA RIGARDO PERDITA JE LA FUMO DE «NAVY CUT».
KIA DOMAĜO, KE VI PREFERAS TABAKON AL ĈI TIU FRANDA SKOMBRA GELATENAĴO.
PU!
MALFRUIĜAS, MALNOVA AMIKO. TAMEN, SE VI AKCEPTAS PRILUMI NIN, MI PLEZURE KAJ VOLONTE TRINKOS UNU LASTAN GROGON ĈE VI.
BONEGA IDEO, WINGFIELD. ANDY, BONVOLU PORTI AL NI VAZOJN. MI RAKONTOS AL VI LA REZULTON DE MIAJ UNUAJ PRIPENSADOJ.
ĈI TIU RAKONTO OKAZIS EN PRAGO, EN LA LASTAJ JAROJ DE LA 16-A JARCENTO. TIE LOĜIS RABENO JEHUDA BEN BELAZEL LOEWI, VIRO KUN EKSTERORDINARA SCIO, KIUN IMPERIESTRO RODOLFO MEM NE HEZITIS KONSULTI MULTFOJE...
SED LA RABENO HAVIS SEKRETON, TERURAN SEKRETON. LI KAPABLIS KREI VIVON!





* VERO= אמת MORTO= מת


KION VI KONSILAS, KE ONI FARU, SINJORO CROSS?
JES, MAJSTRO!
UNUE ONI ELTRINKU ĈI TIUN GROGON, SINJOROJ, POSTE...
WINGFIELD, VI PLONĜU EN LA PASINTECON DE LA VIKTIMOJ, EKKONU ILIAJN KUTIMOJN, KIUJN ILI VIZITADIS, KIOM DA MONRIMEDOJ ILI HAVIS...
EN LA METROPOLA POLICO NE MALMULTAS ESPLORISTOJ NEK ARKIVISTOJ. KUNIGU LA POLICRAPORTOJN KUN LA FOTOGRAFAĴOJ DE LA VIKTIMOJ KAJ LOKOJ DETRUITAJ DE LA GOLEMO.
NI DU, MIA KNAB', SEKVOS LA SPURON DE ĈI TIU STRANGA MANUSKRIPTO.
MI KREDAS, KE UNIVERSITATO OKSFORDO KONSERVAS MANUSKRIPTOJN DE RABENO LOEW, INTER KIUJ TROVIĜAS NEVIDITAJ FRAGMENTOJ DE «SEFER GEBUROTH ADONAI», SED UNUE MI ŜATUS KONTROLI ALIAN AFERON...
SE VI, SINJOROJ, NE VOLAS LA FRANDAN ALTEOPUDINGON, KIUN MI FARIS, MI PETAS VIAN PERMESON POR ENLITIĜI.
BONAN NOKTON, SINJORINO STONE.
OLDA ARPIO!
KOMPRENITE, SINJORINO STONE.
ADIAŬ, WINGFIELD, MORGAŬ NI VIDOS NIN ĈE LA METROPOLA POLICEJO. VI, MIA KNAB', IRU DORMI. MALMILDA TAGO KAJ KURIOZA PERSONO ATENDAS NIN.
LA SEKVAN MATENON, EN ELEGANTA GALERIO PROKSIME DE STRATO BOND, KIE ESTIS LA LIBROVENDEJO DE ARTHUR HILLSLEIGH, FAKULO PRI MALNOVAJ LIBROJ.
BOOK SHOP
BOOKS
Sophia
WORTHI



DING
DING
SALUTON, ARTHUR, KIEL VI FARTAS?
DIO MIA, CROSS, VI ĈI TIE?!
MI ŜATUS ALVOKI VIAN SCION, ARTHUR. ONI DIRAS, KE LA NEGOCADO DE ĈIU MALOFTA MANUSKRIPTO EN LONDONO ALVENAS AL VIAJ ORELOJ IEL AŬ ALIE.
MI... JES. LASU MIN VIDI ĜIN, CROSS.
DIABLE! DE KIE VI PRENIS ĈI TIUN FRAG...? NE, NE EBLAS!
KIO ESTAS LA PROBLEMO, ARTHUR?
NUR ETA MALBONFARTO, CARLAND. TRO DA LABORO, SENDUBE. LA EKSPERTIZOJ, KIUJN MI ANKORAŬ NE FINIS, KAJ...
ĈU TIO ESTAS LA VERO, ARTHUR?
ESTAS SENUTILE MENSOGI AL VI, CARLAND, VI DIVENIS. NU, JES, MI AĈETIS GRAVAN FRAGMENTON DE ĈI TIU MANUSKRIPTO, TRE VERŜAJNE ĜI ESTIS ŜTELITAĴO.
VI DO POSEDAS UNU FRAGMENTON, MALFELIĈULO!
JES, SED KIAL VI DIRAS TION?
ĈAR VI ESTAS EN DANĜERO DE MORTO, MIA KARA! TIAL!
11


ARTHUR, BONVOLU DIRI AL MI TUI, KIEL VI EKPOSEDIS TIUN VERKON?
MI ESTAS ANTIKVAÎISTO DE LIBROJ, CARLAND. EKSTERORDINARAJ MANUSKRIPTOJ ĈIAM RAVIS MIN. KROM TIO, MI KREDAS, KE LA PAĜOJ, KIUJN MI POSEDAS ESTIS ELTIRITAJ DE ALIA PLI AMPLEKSA SKRIBARO, KAJ KE MULTAJ HOMOJ KONKURIS PRI TIU KURIOZA LIBRO.
ĈU VI SCIAS EKZAKTE KIA VERKO ESTAS ĜI?
ĈIO, KION MI POVIS DEDUKTI ĜIS NUN, ESTAS KE TEMAS PRI HEBREA MANUSKRIPTO, KIU DATIĜAS JE LA FINO DE LA 16-A JARCENTO, PROBABLE VENANTA EL CENTRA EŬROPO. LA VENDINTO, KOMERCISTO SUSPEKTINDA, CERTIGIS MIN, KE ĈI TIU VERKO HAVAS KONSIDERINDAN ESOTERAN VALORON, KAJ KE LI VENDIS LA GRAVAN PARTON AL OKULTISMA SOCIETO.
KIE VI KONSERVAS VIAN PARTON DE LA MANUSKRIPTO?
HEJME, EN MONŜRANKO. CARLAND, KION MI FARU? KIAL ĈI TIU LIBRO, KROM TIO KE ĜI ESTIS ŜTELITA DISDE IU ALIA, POVAS KONSTITUI DANĜERON POR MI?
POR VIA PROPRA BONO, ESTOS PLI BONE, KE VI NE SCIOS. NI IROS ĈI-NOKTE AL VIA DOMO POR GARDOSTARI. DUME, PROVU NE ESTI SOLA. ĜIS LA REVIDO, ARTHUR.
BOND STREET
FILTRATE
DUNLOP
KIA VETERO, MIA KNAB'! ONI PROGNOZIS ŜTORMON POR ĈI TIU NOKTO!
MI PENSAS, KE TIU LIBROVENDISTO KAŜAS ION AL NI, LIA SUBITA MALBONFARTO ŜAJNIS SUSPEKTA AL MI.
NU, MIA KNAB', ONI KONTROLOS TION ĈI-NOKTE.
KIAM LA GOLEMO VENOS SERĈI LA MANUSKRIPTON DE SIA MASTRO.


NOKTE, EN LA DOMO DE ARTHUR HILLSLEIGH, EN STRATO REĜINO ANNA
QUEEN ANNE
BONAN NOKTON, SINJOROJ. MI PETIS, KE JARVIS PLILONGIGU SIAN DEĴORON, KAJ ONI INSTALIS NOVAJN RIGLILOJN EN ĈIUJ PORDOJ. NE INDAS TIMI AJNAN ATAKANTON.
ĈU MI RAJTAS VIDI LA MANUSKRIPTON, ARTHUR?
CERTE JES, LA BIBLIOTEKO ESTAS EN LA SUPRA ETAĜO.
ĈI TIE NI ESTOS BONE, ĈI TIU ĈAMBRO NE HAVAS FENESTROJN.
JEN, MIA KARA. LEGU ĜIN, SE TION PETAS AL VI VIA KORO.
BANG!!
KIO ESTIS TIU BRUO?
SEĜO FALIS, SINJORO. NUR TIO.
DIO MIA, JARVIS, ESTU PLI ZORGEMA!
CRAAKK
TIU ĈI ATENDADO FRENEZIGOS MIN! KIU VENUS PRENI ARON DA PAPEROJ ĈI-HORE?
CRAAK
HA HA HAHA



LA LUMO, DIO! JARVIS, ĈU VI BONVOLUS ALPORTI KANDELOJN! JARVIS?!
ANDY, PRENU LA KANDELINGON, KIUN MI VIDIS SUR LA KAMENBRETO.
JARVIS!
ĈI TIU SILENTO ESTAS MALTRANKVILIGA. MI MALSUPRENIROS. ANDY, ELPRENU VIAN PAFILON KAJ NE MOVIĜU.
JARVIS!
KIO OKAZAS?
RESPONDU! MI ESTAS CARLAND CROSS!
MAJSTRO, ĈU VI VIDAS ION?
JARVIS?
AAARGH


AAAAAAHH
KRASH
?!
BANG
MAJSTRO, ATENTU!
אמת
BANG
BANG
BANG
ANDY, TUJ VOKU KURACISTON! KAJ PETU LA METROPOLAN POLICON PRI KELKAJ INSPEKTISTOJ!
MI... AAAĤ...
MI SUFERIS SUFIĈE MULTE JAM... TERURE, CARLAND, ESTIS TERURE... AAAĤ! HALTIGU TIUN ESTAĴON, MI PETEGAS...
TRANKVILIĜU, ARTHUR. LA KURACISTO VENOS TUJE KAJ...
TRO MALFRUE... SINJORO NEVILLE CAMBERLEY... ATENTU...
SINJORO NEVILLE CAMBERLEY, KIU ESTAS TIU?
LA... AAĤ... NEKROMAN-CIISTO... MI...




NU, GRATULON, CROSS! LORDO BASINGSTOKE ĜOJIĜOS KIAM LI EKSCIOS LA NOVAĴON PRI DU PLIAJ MORTINTOJ, KAJ ONI NE MENCIU KE ANKAŬ LA SERVISTO MALAPERIS. KAJ VI DIRAS, KE ANSTATAŬ TIU SUPOZATA GOLEMO, NUN LA MURDINTO ESTIS SORĈKADAVRO... ĈU VI VOLUS, KE MI RAKONTU TION AL LA GAZETARO?
TRANKVILIĜU, WINGFIELD. MI AGNOSKAS, KE ĈI TIU AFERO NE ESTAS SIMPLA, KAJ KE LA ĈI-NOKTA OKAZAĴO NE FARAS ALION KROM PLI-GRANDIGI LA MISTERON, SED ONI DEVAS SEKVI NIAN PLANITAN ITINERON...
PARENTEZE, KIEL IRAS LA ESPLORADO, AMIKO?
JEN LA DOSIEROJ, KIUJN VI PETIS. ONI DEVOS ALDONI LA RAPORTOJN PRI LA ĈI-NOKTA NEKROPSIO. NIAJ INSPEKTISTOJ NE TROVIS EN LA ARKIVO ION KROM ĈI TIO. ĈIUJ VIKTIMOJ ESTIS HOMOJ SEN KRIMAJ ANTECEDENTOJ, TAMEN JA ESTAS AFERO KURIOZA...
LA PLEJMULTO DE VIKTIMOJ LOĜIS PROKSIME DE TOMBEJO. MI LEGU, DO... JEDODAH HARVESTER, EN MONTETO STAMFORD, PROKSIME DE LA TOMBEJO DE PARKO ABNEY. JOSHUA RAYWOOD, EN ORIENTA VOJO FINCHLEY, APUD LA TOMBEJO DE MARYLEBONE.
ANKAŬ ĈI TIE, SINJORO! JERVAS SUNGERWELL LOĜIS EN LA EBENAĴO DE WIMBLEDON, APUD LA TOMBEJO DE PUTNEY VALE... KAJ JOSEPH CURWEN, EN VOJO HARROW, APUD TOMBEJO DE KENSAL GREEN, VERE STRANGE!
EBLE TEMAS PRI NUR KOINCIDO, KION VI PENSAS, CROSS?
MI TIMAS EKKOMPRENI LA VERON, AMIKOJ.
SINJORO SUPERINTENDANTO, NI TROVIS LA ADRESON DE LA VIRO, KIUN SINJORO CROSS MENCIIS ANTAŬ UNU MOMENTO.
HA JES, TIU NEVILLE CAMBERLEY.
SINJORO NEVILLE CAMBERLEY, STRANGA HOMO, SE MI RAJTAS DIRI TION. SINJORO CROSS, LI LOĜAS EN FORLASITA DOMO APUD LA TOMBEJO DE HIGHGATE.



EN ORDO, WINGFIELD! DUM VI FINAS ĈION ĈI TIE, NI DAŬRIGOS NIAN ESPLORON SOLAJ. MI TELEFONOS AL VI POSTE POR DEMANDI PRI LA REZULTO DE LA NEKROPSIO. EK, NI IRU, MIA KNAB'.
PLI DA KADAVROJ, ĈU NE, CROSS?
MAJSTRO, KION NI FARU?
UNUE, NI MANĜU ION, MIA KNAB', NI VIDOS AFEROJN PLI KLARE SE NIAJ STOMAKOJ ESTAS PLENAJ. POSTE, MI VOLUS FARI DETALAN VIZITON AL LA LOĜEJOJ DE LA VIKTIMOJ.
KAJ KIEL RILATAS LA GOLEMO AL ĈIO ĈI?
MI DEVAS AGNOSKI, ANDY, KE ĈI-NOKTE MI JA ATENDIS LA GOLEMON KAJ NE TIUN SPECON DE STRANGA KADAVRO, MIA KNAB'. ESTAS KVAZAŬ DU MALSAMAJ MISTEROJ OKAZUS SAMTEMPE, KUN FORTA INTERLIGITECO.
KION MI POVIS ELTIRI EL LA MANUSKRIPTO DE HILLSLEIGH ESTIS IO TRE HARSTARIGA, ANDY. ĈIUOKAZE, SE MI FINE PRAVAS KAJ LA GOLEMO, AŬ ĜIA REGANTO, VOLAS EKPOSEDI TIUJN PAPEROJN, TIU DEVOS ENIRI EN NIAN DOMON POR SERĈI ILIN.
POSTE, ĈE JEDODAH HARVESTER.
ĈE JERVAS SUNGERWELL.
ĈE JOSEPH CURWEN.
ŜAJNE, KELKAJ EL LA VIKTIMOJ HAVIS MAKABRAJN PASIOJN, ANDY. ĈIO ĈI ODORAS JE KADAVRO-ŜAKRADO.
TAVERN
TUJ VENOS NOKTO, MIA KNAB'. ESTOS PLI BONE SE NI DISIĜUS.


REIRU AL LA METROPOLA POLICEJO, ANDY, KAJ PETU, KE ONI SERĈU ĈIAN INFORMON PRI PROFANADO DE SEPULTEJOJ DUM LA LASTAJ SEMAJNOJ. PRIDEMANDU ANKAŬ SPRATT-ON, LA ARKIVISTON, SE LI ESTAS SOBRA. LA NOMO DE NEVILLE CAMBERLEY MEMORIGAS MIN PRI IO.
KAJ VI, MAJSTRO?
MI VIZITOS LA TOMBEJON DE HIGHGATE!
DUM CARLAND CROSS TRAIRAS WHITEHALL-ON CELANTE LA NORDON DE LONDONO, DENSA NEBULO MALRAPIDE KOVRAS TAMIZON.
DUME, EN LA ARKIVEJO DE LA METROPOLA POLICO.
JEN LA POLIC-RAPORTOJ PETITAJ, SINJORO WHITE. VI POVOS FARI LONGEGAN LEGADON.
OSBORNE, DIRU AL MI: ĈU SPRATT DEĴORAS ANKAŬ DUM LA NOKTO?
TIO DEPENDAS DE BIERO, SINJORO WHITE! SE ĜI ESTAS BONE SERVITA, NI EBLE NE VIDOS LIN. SED SE LA POSEDANTO DE LA «RUĜA LIONO» DEPOSTULAS AL LI LA ŜULDATAN MONON, LI PROBABLE REVENOS.


NEBULAĈO! BALDAŬ ONI NENION VIDOS!
WOOD 3
HIGHGATE
HAMPSTEAD 4
HIGHGATE, FINFINE. MI PENSIS DUM MOMENTO, KE MI NENIAM ALVENUS ĈI TIEN.
DIABLE! MI IRIS LAŬ MALĜUSTA ENIREJO! NUN MI DEVOS TRAIRI LA TOMBEJON.
CHESTER ROAD


JEN, SINJORO WHITE. MI FARIS IOM DA TEO.
DANKON, OSBORN.
ĈU VI TROVIS ION?
JES. LASTATEMPE, LA TOMBOPROFANANTOJ PLIAKTIVIĜIS, SPECIFE EN LA TOMBEJOJ, APUD KIUJ LOĜIS NIAJ VIKTIMOJ. KION DIABLE SIGNIFAS ĈIO ĈI?
SALUTON? ĈU IU ĈI TIE?


BONE! LA BIRDO ŜAJNE FORLASIS LA NESTON!
VI HAVIS BONŜANCON, SINJORO WHITE! JEN SPRATT, ANKORAŬ NE ESTAS TRO MALFRUE.
SALUTON, SINJOROJ!
SALUTON, SINJORO SPRATT, KIEL VI FARTAS?
ĈIELO, JEN ANDY WHITE! KIEL MI POVAS HELPI VIN?
LA GARDOSTARANTO DIRIS AL MI, KE ONI VOLIS VIDI MIN EN LA ARKIVO.
JES, SINJORO SPRATT. ŜAJNE VI SCIAS PLI OL ĈIUJ DOSIEROJ DE LA METROPOLA POLICO KUNIGITAJ, ĈU NE?
NEK HODIAŬ NEK MORGAŬ TIUJ FLAVBEKULOJ DE LA DOKUMENTA CENTRA OFICEJO POVOS ANSTATAŬIGI MIN!
ĈU LA NOMO DE NEVILLE CAMBERLEY ESTAS KONATA AL VI?
CAMBERLEY! NE DIRU AL MI, KE...



DIABLE! JARVIS, MORTINTA! VERŜAJNE MI IRAS LAŬ LA ĜUSTA VOJO...
POST NEVILLE CAMBERLEY ESTIS ARESTITA, ONI TROVIS EN LIA DOMO SUFIĈE DA KADAVROJ POR PLENIGI TOMBEJON. TIU FRENEZULO INTENCIS REVIVIGI ILIN POR FARI EL ILI SERVISTOJN SINDONAJN KAJ OBEEMAJN. SED LIA FAMILIO ŜAJNE HAVIS LIGON KUN LA REĜFAMILIO KAJ SILENTIGIS LA AFERON. LA METROPOLA POLICO EĈ ORDONIS LA DETRUON DE ĈIUJ DOSIEROJ. ĈIUOKAZE, LA AGADO DE JUSTECO FORVELKIS POST LA FORPASO DE SINJORO NEVILLE.
ĈU?! LA FORPASO DE... NE EBLAS!
BONAN NOKTON, SINJOROJ!
LI NOMIĜIS BEN DUST. LI MORTIS LA 23-AN DE SEPTEMBRO KAJ ESTIS ENTERIGITA... DIVENU KIE? EN LA TOMBEJO DE HIGHGATE!
ĈU?!
AŬSKULTU, ANDY! NI PLONĜIS EN TEATRECAN MISTERON. MI ĴUS PAROLIS KUN LA NEKROPSIISTO: LA ULO, AŬ LA AĴO, KIU MORTIGIS ARTHUR-ON HILLSLEGH, ESTAS MORTINTA DE ANTAŬ DU MONATOJ. ONI EĈ TROVIS LIAN NOMON.
HIGHGATE! NEVILLE! DIO MIA, MAJSTRO CROSS!



PANG PANG
AAARÂ!
מת




ĈIELO, WINGFIELD, RAPIDU! PETU POLICAŬTOJN, MIA MAISTRO ESTAS EN DANĜERO DE MORTO!
VENIGU KVIN AŬTOJN, DU INSPEKTISTOJN KAJ OK POLICANOJN! NEBULO?! MI FAJFAS PRI NEBULO! OBEU, KAJ RAPIDE!
מת
AAA!
LA LAMPO NE PLU FUNKCIAS! NUR TIO MANKIS!
EK, ĈIUJ AŬTEN! RAPIDU AL LA TOMBEJO DE HIGHGATE!
2300 PX
SED, KIO ESTAS ĈI...?!
NEEE!!



DAMNE, FERMITA!
PAW
PAW
PLI RAPIDE, PLI RAPIDE!
MI ESPERAS, KE NENIO OKAZIS AL LA MAJSTRO...
HIGHGATE, FINFINE!
ĈIELO! IO BRULAS TIE, RAPIDU!
ANDY!
MAJSTRO! LAŬDON AL DIO!


NI PORTIS LA MAJSTRON FOR DE LA FAJRO, LI NUR RICEVIS MALGRAVAJN BRULVUNDOJN, SED LA ŜOKO ESTIS TERURA.
DUM PLURAJ TAGOJ LI DELIRIS, HAVANTE TIMIGAJN KOŜMAROJN.
SINJORINO STONE FLEGIS LIN KIEL EBLE PLEJ BONE, PREPARANTE POR LI PUDINGON, KIUN LI DUM DELIROJ RIFUZIS...
WINGFIELD SIAFLANKE DAŬRIGIS LA ENKETON SEN MULTE DA SUKCESO. LA FAJREGO DETRUIS LA MISTERAN DOMON DE HIGHGATE KAJ REDUKTIS ĜIN AL RUBO.
LA ESPLORO DE LA MALMULTAJ ATESTOJ NE DONIS AJNAN REZULTON, KROM AMPLEKSAJ POLICRAPORTOJ.
LA BRAVA SUPERINTENDANTO DAŬRE VIZITIS LA MAJSTRON, ESPERANTE VIDI EN LI IUN FAJRERON DE PLIBONIĜO.
TIEL DO, LA KUKOJ DE SINJORINO STONE NE ESTIS TUTE FORĴETENDAJ.
UNU NOKTON, VIVFORTO ENVENIS EN LA MAJSTRON REE. LI POSTULIS SIAN PIPON, TABAKUJON «NAVY CUT» KAJ GLASON DA FORTA VISKIO, KAJ DIRIS:
BONE, MIA KNAB', NI PERDIS TRO DA TEMPO, NI REKOMENCU DE NULO LA ESPLORADON.


NI RESUMU LA OKAZINTAĴOJN. ESTAĴO EKSTERORDINARE FORTA MURDAS DUONDEKDUON DA HOMOJ, VERŜAJNE CELANTE ŜTELI DISDE ILI KELKAJN FRAGMENTOJN DE HEBREA MANUSKRIPTO. ĈI TIUN MANUSKRIPTON FARIS RABENO LOEW, GRANDA SAĜULO, KONATA PRO KE LI SUKCESIS VIVIGI ARGILAN STATUON: LA GOLEMON!
NI ŜANCELIĜAS INTER MITO KAJ REALECO. EN ĈI TIU PUNKTO, ALDONIĜAS MALHELA RAKONTO PRI NEKROMANCIO, KIU ELIRIS EL FORGESITA DOSIERUJO: TIU DE NEVILLE CAMBERLEY. LA PRUVO ESTAS VIVANTA MORTINTO, KIU ATAKIS NIN KAJ MORTIGIS NIAN ĈEFAN ATESTINTON.
BEDAŬRINDE, MAJSTRO, ĈIUJ SPUROJ FINIĜAS TIE. LA METROPOLA POLICO STAGNAS. EĈ LA ĈEFA SUSPEKTULO, KIUN MENCIIS HILLSLEIGH, MORTIS ANTAŬ MULTE DA TEMPO. NENIO HAVAS SENCON.
ALIFLANKE, KIAM MI ATINGIS LA KAŜEJON DE LA NEKROMANCIISTO, LA GOLEMO ESTIS TIU, KIU ATAKIS MIN ANTAŬ OL MALAPERI. KIEL STRANGE, ANDY! MI ANTAŬSENTAS, KE TEMAS PRI DU MISTEROJ INTIME INTERRILATAJ!
MI VOLUS CERTIĜI PRI TIU FORPASO, MIA KNAB'. PETU WINGFIELD-ON PRI SEKRETA MALFERMO DE LA TOMBO DE SINJORO NEVILLE CAMBERLEY. INDUS KONTROLI, KE LA ENLOĜANTO ANKORAŬ ESTAS TIE.
MI PRENOS PECON DA TIU BONEGA KUKO, SINJORINO STONE.
ĜI ESTAS EL AMARA ĈOKOLADO, SINJORO CROSS.
DRING DRING
NU, JEN VIZITO!
PROBABLE ESTAS WINGFIELD. MI ANTAŬSENTAS, KE TIU MANĜEMULO FLARAS MIAN KUKON DE TRE MALPROKSIME.
BONAN VESPERON. HO! KIA ĜOJO VIDI VIN RESANIĜINTA, SINJORO CROSS!
SINJORO SPRATT!
SALUTON, AMIKO!
ĈU FINGRO DA VISKIO PLAĈUS AL VI, SINJORO?
DU, SED NUR POR KOMPLEZI AL VI, JUNA SINJORO!
SINJORO CROSS, MI NE FAROS ĈIRKAŬPAROLON, VI SCIAS KE MI ĈIAM HAVAS KELKAJN LERTAĴOJN EN REZERVO. BONE DO, AMIKO, MI TROVIS SPURON PRI NEVILLE CAMBERLEY!



KELKAJ OKAZINTAĴOJ REVENIS AL MIA MENSO POST LA FATALA NOKTO, EN EN KIU VI PRESKAŬ MORTIS, SINJORO CROSS. ĈEFE RILATE LA KOMPLICOJN DE NEVILLE CAMBERLEY. LI HAVIS SERVISTON NOMATAN SMOLLETT, KIES SPUROJ FORVAPORIĜIS POST LA JUĜAFERO. SED ANTAŬ DU NOKTOJ, FORTUNO REAPERIGIS LIN ANTAŬ MI!
MI TRINKIS PINDON DA BIERO EN «LA TRI HUFUMOJ», BONTENITA TAVERNO EN BERMOND SEY, KIE LA POSEDANTO DONAS AL MI IOM DA KREDITO, KIAM SUBITE...
THREE HORSE SHOES TAVERN
TAVERN
THREE HORSE SHOES
OPEN
SUFIĈE, SMOLLETT, VI FRIPONADAS ĈE LA KARTOJ! SE VI PLUFARAS TION, VI RENKONTIĜOS KUN VIA IAMA MASTRO PLI RAPIDE OL ATENDITE, AVARULO!
LOCH LOMOND WHISKY
TRANKVILIĜU, BEN! EVIDENTE LI ESTAS TRO EBRIA!
MI REKONIS LIN MALGRAŬ LA TEMPOPASO KAJ LA BIERO DETRUINTA LIAN VIZAĜON. LI ESTIS WILL SMOLLETT, LA ANIMO KIUN NEVILLE CAMBERLEY DAMNIS.
TAVERN
MI SEKVIS LIAJN PAŜOJN ĜIS MODESTA KVARTALO, INTER ARBETARO WILSON KAJ LA VOJO JOHN ROLL.
TIU DRINKULO HALTIS DUM LONGA TEMPO EN ALIAJ DU TAVERNOJ: «LA MALJUNA LIBERALULO» KAJ «LA BRAKO DE L' SEĜO». MI NE POVAS REKOMENDI ILIN AL VI, SINJORO CROSS, ĈAR LA BIERO ESTAS MALBONE SERVITA KAJ LA KLIENTARO ESTAS TRE MALAFABLA.
ALE
ĈIRKAŬ NOKTOMEZO, SMOLLET EKFORIRIS, SED MI PERDIS LIN ĈE PARKO SOUTHWARK.
MI PRIDEMANDIS LA POSEDANTOJN DE AMBAŬ TAVERNOJ, SINJORO CROSS. LA MALJUNULO IRAS TRE OFTE.
PRENU ĈAPELOJN, MANTELOJN KAJ PAFILOJN, AMIKOJ. NI IRU!




EBLE LA MALJUNULO NENION SCIAS, MAISTRO.
SENDUBE, ANDY. SED ONI NE IGNORU EĈ AJNAN SPURON.
IRU LAŬ VOJO JAMAIKO, CROSS. NI ESTAS ALPROKSIMIĜANTAJ,
EN ORDO, SPRATT.
JEN «LA MALJUNA LIBERALULO», SINJORO!
GRENSON SHOES
OLD WHIG
SMOLLETT, ĈU? MI NE VIDIS LIN.
RANDY
HE, KAMARAD'! ĈI-NOKTE MI LIN VIDIS EN «LA NIGRA KATO». LI TAMEN HAVIS APENAŬ MEZ-BONAN ASPEKTON, TIU WILL!
MI DIRIS AL LI «HE, WILL. KIO MISAS PRI VI ĈI-NOKTE? ĈU VI NE REGALOS MIN PER UNU VISKIO?».
BARCLAY'S STOUT
KAJ ĈU VI SCIAS, KION LI DIRIS, JUNULO? ĈU VI SCIAS, KION LI RESPONDIS?
LI DIRIS «MI HEJMENIROS, GUS» (MI ESTAS GUS, KAMARAD') KAJ MI DUOBLE ŜLOSOS ĈIUJN PORDOJN. NEKREDEBLE, SINJOROJ!
GUS, DIRU: KIE LOĜAS SMOLLETT?
MI KREDAS, KE EN STRATO PROSPECT, EN RAT-TRUO APUD MAGAZENO BAINES.



HE, KAMARAD'! KIAL VI HASTAS TIOM? NI NE DRINKIS ANKORAŬ!
SCOTCH ALE
SCOTCH ALE
RAPIDU, SINJOROJ! EBLE NI ANKORAŬ HAVAS TEMPON!
BAINES REMOVALS
BONDED-WAREHOUSE
ĈI TIE, MAJSTRO!
WILL SMOLLETT
SMOLLETT, MALFERMU. MI SCIAS, KE VI ESTAS ENE. MI VOLAS PAROLI KUN VI, NE TIMU. MI NOMIĜAS CARLAND CROSS.
LA PORDO ESTAS MALŜLOSITA!
SMOLLETT?
NI ALVENIS TRO MALFRUE, UNU PLIAN FOJON!
ĈIELO, KIA HORORAĴO!




LA AMPOLO ESTAS ANKORAŬ VARMETA. PROBABLE NI INTERROMPIS LA MURDINTON. ANDY, ĈIRKAŬRIGARDU LA STRATON. LA AGRESINTO EBLE LASIS IUN SPURON!
BONE, MAJSTRO!
KAJ NI, MIA KARA SPRATT, NI IRU ĈIRKAŬRIGARDI ĈI TIUN LOĜEJAĈON.
PU!
HO HO! ĈI TIO ESTAS UNUARANGA PRUVOBJEKTO. BRAVE, SPRATT!
SPRATT! RIGARDU!
RIGARDU LA POZICION DE LA KORPO! ŜAJNAS, KE SMOLLET FALIS ĈI-MANIERE VOLONTE, POR KAŜI ION SUB SI. DIO MIA, ĈIO PLENAS DE SANGO!
LA RIKOLTO ESTAS TRE MAGRA. KELKE DA MALNOVAJ LETEROJ KAJ ĈI TIU FOTOGRAFAĴO. KIE MI VIDIS ĈI TIUN KONSTRUAĴON ANTAŬE?
HO! LETERO, KIUN SUBSKRIBIS NEVILLE CAMBERLEY!
MAJSTRO, HELP...!
VROOOM
VRO
ANDY! DIO MIA!



H.J. DAVIS & SONS
HASTU, SPRATT! METU ANDY-ON EN LA MALANTAŬON! NI NE PERDU EĈ UNU SEKUNDON!
STRATO ROTHERHITE... SENFINA STRATO. NI DEVANCOS ILIN TUJ.
SED TIU ESTAS... DIO MIA! NEVILLE CAMBERLEY!!
MAGIC LAND
TTÛÛÛT
VROOOOOOOO
O. GRENSON 1990


GROSSMITH
MAGIC LAND
DIABLE! NI PERDIS ILIN!
LA SEKVAN TAGON, EN LA OFICEJO DE LORDO BASINGSTOKE.
SINJORO CROSS ĴUS RESUMIS LA STATON DE SIA ESPLORADO, SINJOROJ. MI PETAS, KE VI KOMPLETIGU LIAN INFORMON PER TIO, KION VI POVIS TROVI LAŬ LA TASKOJ, KIUJ ESTIS KONFIDITAJ AL VI.
WINGFIELD!
ĈI-MATENE MI SENDIS HOMOJN EKZAMENI LA TOMBON DE NEVILLE CAMBERLEY, LORDO. TEMAS PRI TASKO TIKLA KAJ APENAŬ LAŬLEĜA, BALDAŬ ONI HAVOS LA REZULTOJN DE ĈI TIU KOMISIO.
KION DIRAS LA LABORATORIOJ, WITCHET?
NI PLENUMIS GRAFOLOGIAN ANALIZON DE LA LU-KONTRAKTO DE LA DOMO DE HIGHGATE, KOMPARANTE LA MANSKRIBON KUN TIU DE LA LETEROJ TROVITAJ ĈE SMOLLETT. ĜI ESTAS FALSAĴO!
KION TROVIS VI, SOAMES?
ONI KOMENCIS DISKRETAN PRIDEMANDADON AL LA ATESTINTOJ DE LA CAMBERLEY-AFERO. LA REZULTOJ ESTAS MALABUNDAJ, TIUJ HOMOJ CELIS ETERNAN ANONIMECON, SED ĈIUOKAZE JA ESTAS MALTRANKVILIGA ELEMENTO: LA JUĜISTO, KIU OKUPIĜIS PRI LA AFERO, MALGRAŬ SIA AĜO, REKONIS IUJN NOMOJN INTER LA VIKTIMOJ DE LA GOLEMO...
MIAFLANKE, MI KOMISIIS AL LA URBODOMO TROVI LA KONSTRUAĴON DE ĈI TIU BILDO, TROVITA ĈE SMOLLETT.
PROBABLE TEMAS PRI TEMPLO, KIE RENKONTIĜIS DISĈIPLOJ DE CAMBERLEY. ĈI TIU LOKO NE POVIS ESTI TROVITA, MALGRAŬ KE ĜI MENCIIĜIS DUM LA PROCESO.
DIO MIA! SPRATT! LA SAMA FOTOGRAFAĴO ESTIS EN LA LOĜEJO DE JEDODAH HARVESTER, ĈIO INTERLIGIĜAS, SED NI DEVAS TROVI TIUN TEMPLON.
TOC TOC
ENPAŜU!
MIA LORDO, SINJOROJ. JEN LA REZULTOJ PRI NIA VIZITO AL LA TOMBO DE NEVILLE CAMBERLEY, LA SEPULTEJO ESTAS NETUŜITA KAJ LA KORPO TROVIĜAS TIE.
!




DUME, EN STRATO BAKER...
LA MAJSTRO DIRIS, KE LI VENOS JE KIOMA HORO, SINJORINO STONE?
VI SCIAS, KE SINJORO CROSS NE HAVAS HORARON. ĈIO, KION LI PETIS AL MI, ESTAS KE MI FLEGU VIN BONE.
HO, MI FARTAS MULTE PLI BONE. MI ANTAŬSENTAS, KE MI FAROS HONORON AL VIAJ PLADOJ ĈI-NOKTE, SINJORINO STONE.
TION MI ESPERAS, ALMENAŬ SE PHILPOTTS, LA VIANDISTO, ALPORTAS LA ŜAFIDAN VIANDON, KIUN MI MENDIS.
LI JAM MALFRUAS JE TRIDEK MINUTOJ. PROBABLE LI RESTIS DRINKANTE ĈE SINJORINO BARNETT, TIU MALJUNA STRIGO.
DUM ONI ATENDAS LA VIANDOVENDISTON, MI ESTOS EN LA OFICEJO DE LA MAJSTRO.
BONE, LA MAJSTRO NE KOLEROS SE MI KONSULTAS LIAJN NOTOJN. ĈION KONSIDERANTE; MI ESTAS KIU ORDIGOS ĈI TIUJN PAPEROJN POSTE.
ŬAŬ, LA MANUSKRIPTO DE LOEW, KAJ ESTAS MARĜENAJ NOTOJ!
KIA HORORAĴO! NUR SE ĈI TIO ESTUS VERO...
TOC TOC
MI MALFERMU, SINJORO ANDREW. PROBABLE ESTAS SINJORO PHILPOTTS KUN LA ŜAFID-KRURO. LI AŬDOS MIN!
SINJORO PHILPOTTS, VIA ŜAFID-KRURO ALVENUS PRI RAPIDE PER POŜTO!



KION VI PENSAS PRI ĈIO ĈI, MIA KARA AMIKO?
MI PENSAS, KE IU ŜAJNIGAS SIN CAMBERLEY, SED MI NE SCIAS LA KIALON.
JES, STRATO ROTHERHITE, PROKSIME DE NORWAY GATE! 50 JAROJ, ĈU? INTERESE...
KONCERNE LA MURDON DE SMOLLETT, LORDO, NENIU EL LA MALMULTAJ NAJBAROJ AŬDIS ION. NIAJ VIROJ NUN KONTROLAS ĈIUJN KROMĈAROJN EN LONDONO, SED TIO POSTULOS TEMPON.
DRIiiNG
SINJORO CROSS, TIU KONSTRUAĴO KIU ŜAJNE INTERESAS VIN TIOM MULTE... ĜI ESTAS LA COLWIN-KIRKO, METODISMA TEMPLO FORLASITA DE ANTAŬ 50 JAROJ, MASONFERMITA PRO SIA MALNOVECO. ALIA SPURO, KIU PORTAS ONIN AL SAKSTRATO.
NE TUTE, MIA LORDO, EN TIU KVARTALO MI PERDIS LA MURDINTOJN DE SMOLLET HIERAŬ NOKTE. SE VI AKIRAS LA PERMESON DE LA LONDONA URBODOMO POR MALFERMI TIUN TEMPLON, MI ŜATUS EKZAMENI ĜIN.
KIAL NE! NIAJ ALIAJ OPCIOJ ELĈERPIĜIS. MI ORDONOS, KE ONI PRETIGU TEAMON. WINGFIELD, VI... HO, LA TELEFONO DENOVE...!
DRING
DRING
HA LO?
VIANDISTO? JES, CROSS ESTAS ĈI TIE, MI DONU LA TELEFONON AL LI.
SINJORO CROSS? JES, MI VOKAS EL LA POLICEJO DE STRATO WIGMORE, ĈI TIEN VENIS VIANDISTO NOMATA PHILPOTTS. MI DUBIS ĈU MI ATENTU LIAJN VORTOJN AŬ NE, ĈAR LI ODORAĈAS JE BRANDO, SINJORO. LI DIRAS, KE VIA DOMO ESTIS DETRUITA DE STATUO.
1935
KIO? MI IRAS!



STRATO BAKER
SINJORO CROSS, NI ATENDIS VIN. JEN PHILPOTTS.
MI... HE...
MMMMMMH
LA MANUSKRIPTO DE LOEW MALAPERIS... ANKAŬ ANDY KAJ SINJORINO STONE. KAJ DENOVE ĈI TIUJ POST-LASAĴOJ DE ARGILO.
MMMMH
TIU SONO VENAS DE LA ŜRANKO, SINJORO!
MMMMH
SINJORINO STONE! LAŬDON AL DIO!
MMMHH
ĈIELO, SINJORO CROSS! LA STATUO DETRUIS ĈION, ĈI TIO ESTAS SKANDALA!
NI IRU AL LA KERNO. SINJORO PHILPOTTS, KION VI EKZAKTE VIDIS?
NU, MI VENIS ĈI TIEN POR LIVERI UNUA-RANGAN ŜAFIDAN KRURON, SINJORO CROSS. MI AGNOSKAS, KE MI ALVENIS IOM MALFRUE, VI SCIAS KIEL ESTAS KLIENTOJ, GLASOJ TIE KAJ ĈI TIE... RESUME, MI ALVENIS, KAJ KION MI VIDIS? GRANDAN STATUON ELIRANTAN EL LA DOMO, KUN STRANGEGA HARARO KAJ SAKO ĈE L' DORSO.
EBRIULAĈO!
JEN LA PLEJ STRANGA PARTO, SINJORO CROSS: LA STATUO SURIRIS SUR KROMĈARON KAJ FORIRIS.
NE EKZISTAS AINA DUBO ĈI-FOJE. VOKU SUPERINTENDANTON WINGFIELD, LI RENKONTIĜU KUN MI EN GOLWIN-KIRKO. LA MILITO EKIS!


ANDY, DIO MIA! ESPEREBLE NE ESTAS TRO MALFRUE!
NORWAY GATE. ESTOS PLI PRUDENTE PIEDIRI LA LASTAJN METROJN.
NORWAY GATE
MI ĈIRKAŬRIGARDU ĈI TION, DO.
JEN LA MURO DE LA TEMPLO! DEVAS ESTI ENIREJO.


PU! KIA FETORO! KIO DIABLE DISVOLVIĜAS ĈI TIE?
MORTINTOJ, ANKORAŬ PLI DA ILI! KIA ABOMENAĴO!
HO! ESTAS LUMO!
ANDY!
HMMM! HMMM!
HMMM! HMMM!
BONAN NOKTON, SINJORO CROSS!



HAHA HAHA HAHA HA
SINJORO NEVILLE CAMBERLEY!
MI ATRIBUAS TION AL LA ŜOKO, SINJORO CROSS, AŬ VI ESTAS MALPLI INTELIGENTA OL MI SUPOZIS.
JES, MURDOCK! JE VIA SERVO, CARLAND CROSS!
TIU VOĈO... NE! NE EBLAS! MURDOCK!!
HAHA HAHA HA
MURDOCK. ANKAŬ KONATA KIEL BALDUR VON KLOTZ, INTERNACIA SPIONO KAJ HARDITA KRIMULO, KIES TERURAJ KRIMOJ POVUS OKUPI PLURAJN VOLUMOJN EL LA MEMORAĴOJ DE CARLAND CROSS. FIA KAJ MALESTIMINDA ESTAĴO, FRENEZA MORTIGANTO KAJ TIEL PLU.
SE VI PENSIS, KE VI LIKVIDIS MIN DUM LA AFERO DE LA TEGMENTAJ LUKOJ, VI MALMULTE KONAS MIN, SINJORO CROSS!
MI BEZONIS KELKE DA TEMPO POR REAPERIGI, SED MI ALVENIS, KAJ NUN NENIO POVOS HALTIGI MIN!
LA ILUZIO DE VIAJ MEĤANIKAJ STATUOJ NE MULTE DAŬROS. LA GOLEMO ESTAS BELA TROMPAĴO!
MAŜINO, VI PRAVAS...SED ESTAS MULTE PLI OL TIO EN LA SCIENCO DE RABENO LOEW, CROSS, ATENDU ION MULTE PLI BONAN NUN. MI REGAS MORTINTOJN, POLICANAĈO!
KOMPRENU, MI REGAS LA MORTINTOJN!
HA HA HA HA HA HAHA HA HA H



DIO MIA, MURDOCK, VI ESTAS KOMPLETE FRENEZA!
KIA SENSENCAÎO, MURDOCK! MI POVAS PRUVI, KE ĈIO ĈI NE ESTAS PLI OL LER-TA SURSCENIGO!
KIEL VI AŬDACAS, MIZERA VERMO? VI PAROLAS KUN TIU, KIU KAPABLIS REGI MORTINTOJN!
VI MEM VOLIS ĈI TION, CROSS. MI ELVOKAS SUR VIN LA NOKTAJN SOLDATOJN, KIUJN MI REVENIGIS EL LA ALIA FLANKO!
אמת
MAJSTRO, MI AŬDAS BRUOJN EN LA KRIPTO!
ĈIELO! KIA ABOMENAÎO!


DUME...
ĈU VI KONSCIAS, KE VI MOVIGIS PRESKAŬ LA TUTAN METROPOLAN POLICON PRO SIMPLA INTUICIO KAJ PRO LA ATESTO DE DRINKEMA VIANDISTO, KIU KREDAS, KE LI SONĜAS NUN?
HIK!
SED... SUPERINTENDANTO, VI PERFEKTE SCIAS, KE LA ANTAŬSENTOJ DE CARLAND CROSS MALOFTE ESTAS ERARAJ. ESTUS PLI BONE SE VI DIRUS, KE ĈI TIU AFERO ESTAS TRO KOMPLIKA POR VI!
NU, SPRATT, NOMU MIN STULTULO KIAM VI KOMPRENOS ION AJN PRI ĈI TIU AFERO ENHAVANTA PROMENANTAN STATUON, REVIVIĜINTAJN MORTINTOJN, BRULANTAJN TOMBEJOJN, FORLASITAJN PREĜEJOJN... ĈI TIO NE ESTAS ENKETO, SED GRANDA BLAGO!
MI KREDAS, KE GOLWIN-KIRKO ESTAS SIMPLE MALPLENA!
BONE, ALMENAŬ NI POVAS MANĜI LA ŜAFID-KRURON DE PHILPOTTS POST LA TRASERĈO. ONI DIRIS AL MI, KE LIAJ ŜAFIDAĴOJ FAMAS!
KAJ MI FIERAS, SINJORO SUPERINTENDANTO.
JEN GOLWIN-KIRKO, SINJORO WINGFIELD!
NI ĴUS ALVENIS, SINJORO SUPERINTENDANTO. IO OKAZAS ENE, KRIOJ AŬDEBLIS.
POLICE
EN ORDO, OKUPIĜU PRI TIU RATOTRUO!
RESPEKTOPLENE, SINJORO SUPERINTENDANTO, NE ESTOS TIOM FACILE. ONI BEZONAS PIKPIOĈOJN.
ALPORTU ĈION BEZONATAN, JE MIL DEMONOJ, SED RAPIDE! ONI BATALEGAS ENE DE TIU ĈI KIRKO!



PAN
PAN
CLIC
CLIC
JEN MIAJ SERVISTOJ, CROSS! REVIVIGITAJ DANKE AL LA TERURA SCIENCO DE RABENO LOEW! HAHAHAHA!
UNUAFOJE EKDE ILIA MORTO, ILI MANĜOS! ILI MANĜOS LA PLEJ FAMAN DETEKTIVON EL ANGLUJO!
ANDY, ŜIRMU VIN MALANTAŬ MI, MIA KNAB'!
ESTAS SENUTILE, CARLAND CROSS, ILI NE ĈESAS VENI!
HAHAHAHAHAHAHA
HELPON, MAJSTRO...! NEEEEE!
BONAN APETITON, MIAJ KARAJ. ADIAŬ, SINJORO CROSS.
AHAHAHAHA


ADIAŬ, MAJSTRO! AAAAAAA!
מת
HE? KIO...?!
MIZERA KREITAÎO! VI AŬDACAS RIBELI KONTRAŬ MI!
HALTU, SAKRILEGIULO!
PAN
RAPIDU! FALIGU LA PORDON!


SED, KIO DIABLE ESTAS ĈI TIU AĈAĴO...? MI PENSIS, KE ONI NE VOLIS PLI DA KADAVROJ!
DIRU, PHILPOTTS, ĈU VIA KRURAĴO ESTAS TIO, KIO ODORAS TIEL AĈE?
CERTE NE!
ATENTU, MIA KNAB'! LA VOLBO CEDAS!
HASTU! ONI ELIRU EL ĈI TIE ANTAŬ OL ĈIO DISFALOS!
CROSS, ANDY! MI ĜOJEGAS, KE MI REVIDAS VIN!



CCC
CRRRR
RRRRR
LA SEKRETO DE RABENO LOEW DEFINITIVE PERDIĜIS POR ĈIAM!
KELKAJN TAGOJN POSTE, EN LA METROPOLA POLICEJO.
KAJ TIEL, KARAJ SINJOROJ, MI POVIS REKONSTRUI LA PROCEZON DE ĈI TIU EKSTERORDINARA AFERO. BALDUR VON KLOTZ, ALINOME «MURDOCK», TIU GENIULO DE KRIMARTO, KAPABLIS KOSTUMI SIN KIEL LA FORPASINTA NEVILLE CAMBERLEY, DIO SCIAS PER KIAJ RIMEDOJ, KAJ SUBMETI LA IAMAJN KOMPLICOJN DE LA NEKROMANCIISTO. TIO, KION LI ĈEFE SERĈIS ESTIS LA RIĈAĴO, KIUN CAMBERLEY SUKCESIS KAŜI DE LA ENKETISTOJ SIATEMPE, SED RAPIDE LI MALKOVRIS LA POTENCON, KIUN LI POVIS ELTIRI EL LA TERURAJ SPERTOJ DE LA KRIMULO.
ĈU TIUJ TERURAJ AFEROJ VERE EBLAS, SINJORO CROSS?
REALECO POVUS ESTI EĈ PLI MALBONA, MIA LORDO. APERIS LA MANUSKRIPTO DE RABENO LOEW. ĜI ESTIS ŜTELITA DE SENSKRUPULA BIBLIOTEKISTO, KIU AGIS POR PERANTO: EBENEZER STEIN.
LA KOMPLICOJ DE MURDOCK PRESKAŬ SENMONIĜIS POR AKIRI PARTON DE LA MANUSKRIPTO KAJ KUNDIVIDI LA LEGAĴON. MURDOCK, KIU KOMPRENIS LA GRAVECON DE TIU MALKOVRO, DECIDIS FARI ĈION SOLA, KONSTRUANTE ROBOTON ASPEKTANTAN KIEL LA LEGENDA GOLEMO. ĈI TIU ESTAĴO SEMIS TERURON EN LA OKULTISMAJ RONDOJ, KAJ MURDOCK REKONSTRUIS POIOME LA MANUSKRIPTON BEZONITAN POR KOMPLETIGI LA ESPLOROJN DE CAMBERLEY.


SED DIRU, CARLAND: KIAL LI SENDIS UNU EL TIUJ VIVANTAJ MORTINTOJ ĈE HILLSLEIGH-ON?
SENDUBE POR ELSPURIGI NIN. LI PROBABLE EKSCIIS, KE MI ESPLORIS LA AFERON, KAJ PREFERIS KULPIGI SIAN GOLEMON, ATENDANTE LA OKAZON KAPTI MIN. KAJ TIU OKAZO NE MALFRUIĜIS.
MAJSTRO, KION VI DIRAS PRI LA GOLEMO DE GOLWIN-KIRKO? TIU, KIU MIN FORKAPTIS.
TIU GOLEMO ESTIS DUA EKZEMPLERO, MIA KNAB', SENDUBE PLI BONE KONSTRUITA OL LA UNUA. MURDOCK NE ESTIS STULTA, LI SCIIS PROFITI LA TEKSTON DE RABENO LOEW. TION PRUVAS LIAJ SPERTOJ EN LA AREO DE NEKROMANCIO, KAJ NI SCIAS KIOM TERURA TIO ESTIS.
KAJ LA MURDO DE L' MALJUNA SMOLLETT?
MURDOCK FORIGIS ĈIUJN ĈEFAJN ATESTINTOJN, KAJ VOLIS FORVIŜI AJNAN ŜANCON SPURI LIN. AGNOSKITE, LI PRESKAŬ ATINGIS TION. SEN VI, SPRATT, NI NE ESTUS ALVENINTAJ AL GOLWIN-KIRKO!
KURIOZA AFERO, SINJOROJ, MI KONSIDERAS VIAN DISKRETECON KIEL FAKTON. NE NECESAS TIMIGI HOMOJN PER RAKONTOJ TIOM TIMIGAJ. UNU PLIAN FOJON, MI VIN DANKAS PRO ĈIO, SINJORO CROSS. ANGLUJO ŜULDAS AL VI, KE VI FORIGIS VERAN KRIMAN MINACON.
DANKON, MIA LORDO!
NU, MAJSTRO, MI NE KOMPRENAS KIAL LA GOLEMO RIBELIS KONTRAŬ MURDOCK JE LA FINO.
ĜI SAVIS NIAN VIVON, MIA KNAB'. MI KREDAS, KE RABENO LOEW ESTIS TRE SAĜA. LI METIS EN SIAN SCIENCON IAN MORALAN LIMON, KIUN MURDOCK NE MALKOVRIS ĜIS TIU MOMENTO. ONI NE LUDU SENPUNE KUN VIVO KAJ MORTO, NE ATENDANTE PAGI UNU PER LA ALIA!
PARENTEZE, MIA KNAB', ĈU VI SCIAS KION KUIRIS NIA SINJORINO STONE POR LA VESPERMANĜO?
KRURAÎON, MAJSTRO!
OLEFFE - GRENSON 1990
The End